

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 30, 1. Majo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

### Uzu praktike Esperanton!

La Japana Esp. Komercia Korporacio estas laŭŝajne tute esperanta entrepreno. Ni atendas de esperantistoj, ke almenaŭ ili ĉiam kaj ĉie uzus nur Esperanton, precipe se la celo de ilia entrepreno estas: per Esperanto fari komercon kaj enkonduki Esperanton en la praktikan vivon! La komenco estas malfacila, ĉar oni devas kuraĝe komenci la esp. korespondadon kun firmoj, kiuj eble ne havas esp. korespondantojn. Tamen nur tiu ĉi vojo kondukas al la sukceso!

Jam en mia antaŭa artikolo mi skribis, ke la grandaj firmoj, kiel ekzemple Cook & Co., Ideal Skribmaŝin-Fabriko, Ovomalfino-Fabriko ktp., kvankam ili enkondukis Esperanton, uzos ĝin nur, se ili ricevos lertojn en Esperanto. Tio nature ne estas bona, se ĉiu atendas, ĝis la alia komencos skribi al li en Esperanto; tiamaniere ni neniam atingos la praktikan uzadon de Esperanto. Mi jam skribis, ke estas nur entuziasmo, kiuj komencas skribi esperante, la aliaj ĉiuj nur atendas. Do ne multe valoras, se granda firma enkondukas Esperanton, ĉar nur kelkaj semedanoj sin jurnas al ĝi per esp. letero, ofte nur pro entuziasmo aŭ scivolemo. Tamen mi ne povas riproĉi la nomitajn aŭ aliajn grandajn firmojn; mi ja skribis: tiel longe, kiam ili ricevos lertojn en sia propra lingvo (angla, franca, germana), ili ne uzos Esperanton! Tio ĉi estas tute natura. Tamen nia celo estu, ke grandaj firmoj, ŝtatoŝefoj ktp. ekuzu Esperanton, precipe tiuj, kies nacia lingvo ne estas el la grandaj disvastigitaj lingvoj. Bedaŭrinde ankaŭ tiuj uzas plue anglan, francan, germanan, hispanan lingvojn, ĉar ili opinias, ke Esperanto estas ankoraŭ tro malforta, por ke ili povu komenci per ĝi, kaj ili estas jam enkondukitaj per la „mondlingva“ (angla, franca, germana ktp.) korespondado. Multan propagand laboron ni bezonas por fine konvinki ilin. Jardekojn! La komercistoj estas en tiu ĉi rilato tre konservativaj.

Des pli mirige estas, se firmo, kiel la supre nomita japana, kiu ŝajnas esti nur esperanta kaj per-esperanta firmo, kies nacia lingvo ne estas „mondlingvo“, korespondas kun firmo de alia, malgranda nacio ne en sia oficiala lingvo (do en Esperanto), sed per alia. Tiamaniere ĝi nenion helpas al nia movado.

Mi devas priskribi, ke supre nomita firmo, kies esp. cirkulerojn ricevitan ĝradamase mi transdonis al la granda hungara firmo „Internacia Eksporia kaj Importa A. S., Budapeŝt“ (la plej granda de la lando), efektive negocadas kun tiu ĉi firmo,

sed sub esp. firmonomo en angla lingvo! Mi hazarde eksciis, ke la hungara firmo havas ofiston, kiu scipovas la esp. lingvon. La firmo nature ne multe taksas Esperanton kaj uzas kun eksterlando parte la anglan lingvon, havante specialan anglan korespondanton.

Se lu ajn komizo diras al sia ĉefo, ke li povas korespondi esperante, la ĉefo plej ofte ridante kaj bonvole diras al li: „Estus pli bone, se vi okupus vin per aliaj lingvoj; Esperanton ni ne bezonas, eble neniam bezonos!“ Kaj tio restas ĉie, ĝis aliaj firmoj skribos: Aŭ vi korespondu en nia nacia lingvo (do en supre menciita okazo japane) aŭ en la neŭtrala Esperanto!“

„Utopio!“ diras tiuj, kiuj bone konas la komercan mondon. Efektive utopio, se eĉ esperanta firmo korespondas angle anstataŭ esperante! Sed se tio restas, mi ne atendas triumfon de nia movado. Nur energia altrudo de Esperanto enkondukos ĝian praktikan uzadon. Kaj tion devas komenci la esperantistoj mem. Hoŭtu, kiu ne faras sian devon! Oni vere perdas la esperon je la estonteco de nia movado, vivante tian indiferentecon.

Pardonu al mi, mi ne volas ofendi iun ajn, sed — kvankam la januara numero de „Esperanto“ min kulpigas pro trograndigado — mi tamen devas priskribi la obiekivan situacion kaj ne la ŝajnan. Ni ne trompu nin mem!

Vere, ni ne trograndigu! Sed estas ja trograndigo, se ni legas en ĉiuj numeroj de esp. gazetoj, ke komenciĝis tiom da kursoj kun tiom da lernantoj. Miloj kaj miloj do lernas Esperanton? Ne! Ni bone scias kaj speras, ke ofte eĉ ne dekono de la kursanoj restas ĝis la fino, kaj eĉ multaj, kiuj restas ĝis la fino, ne restas esperantistoj.

Mi scias, ke miloj korespondas per poŝtkartoĵoj esperante, ofte nur por kolekti poŝtkartoĵojn kaj poŝtmarkojn. Sed tiuj ne estas efektivaj esperantistoj!

Ankaŭ mi ricevas bedaŭrinde multajn poŝtkartoĵojn de korespondemuloj; multaj transdonas al mi siajn adresojn por enmeti en la gazetojn: ili volas korespondi, sed ili estas plejparte komencantoj, kiuj m-m nur kelkajn lecionojn lernis, kiuj ofte per kamarado tradukigas la skribaĵojn kaj el vortareto la respondojn, — kiuj post kelkaj monatoj perdas la emon, kiel infanoj kutime, se la ludilo jam ne estas nova, kaj kiuj neniam finlernas Esperanton. Ofte mi parolis kun personoj, kiuj antaŭ dek jaroj lernis Esperanton kiel lernantoj, eĉ korespondis kun la tuta mondo, sed ili baldaŭ forgesis ĝin kaj scias nun jam preskaŭ nenion. Ne la poŝtkarta korespondado estas nia celo; ĝi povas esti modesta komenco, plej primitiva uzado de nia lingvo por praktikaj celoj, sed tio ne povas resti.

En sekaj ejoj (loĝejoj) la fulmo iras preskaŭ ekskluzive en plafonojn kaj murojn kaj nur malofte laŭlarĝe de la spaco. Tial por la loĝantoj dum fulmoindro restado en loĝejoj estas la plej ŝirma.

La telefonoj kaj aliatensiaj konduk-fadenoj, kunligitaj kun pli ampleksaj pejzaĝaj gvidataj metafadenoj posedas ja por forigo de tro alta tensio specialajn fulmo-forigilojn respektive fulmo-protektilojn. Tamen estas konsilinde ne tuŝi dum fulmo-tondro tiajn aparatojn. Sole starantaj konstruaĵoj, kiel pejzaĝaj kolonioj ktp estas pli facile trafataj ol domoj en grandaj urboj. Ĉe la lastaj la fulmo havas pli facile okazojn, atingi la teron sen efiki malutilon, pro la metalamasoj esiantaj grandnombre en la konstruaĵoj (tegment-kanaletoj, akvo- kaj gasgvidiloj).

Dum nova konstruo de sole starantaj konstruaĵoj povas esti kunmetata simpla fulmo-forigilo sen gravaj pli-elspezoj. Kiel enkapitolo povas servi por tio: venflagoj, fetaĵ kaj mentubaj kapoj k. a. La konstrua gvidmaniero povas esti farata per firslamenoj, laĉaj ŝirmiloj sur la frontono, tegmentaj defluiloj kaj pluvo-forkondukaj tuboj. Se ekzistas akvotuboj, tiuj estu uzataj por fulmlinterigo. Nur se ne trovigas supre nomitaj metaloj, specialaj kondukiloj el fero aŭ el kupro estas necesaj.

Pli frue oni havis la opinion, ke per altaj kaj orumitaj pintoj estus elradiata aŭ ensorbata tiom da elektro, ke oni povus tute malhelpi la enbaton de la fulmo. Sed la sperto montris, ke la fulmo ensalis ankaŭ en konstruaĵojn, kiuj havis bone faritajn fulmo-forigilojn.

La celo de la fulmo-forigilo tial nur povas esti forkonduki la fulmon sendanĝere teren. Tio estas

La eksteraj sukcesoj ne multe helpas, ili estas ofte nur sur la papero: la morala helpo de komerca ĉambro, la promeso de firmo, ke ĝi korespondos en Esperanto, se ĝi ricevos esperante skribitan leteron, la promeso de instruado de Esperanto en lernejoj (kiel okazis en Ruslando kaj nun en Hungarlando, kie tamen oni ne instruas ĝin pro diversaj mankoj), la promeso de instruado en Finnlando (kie, kiel antaŭ dek jaroj sur insulo Samos, nova registaro reprenas la permeson), kaj la malapero de esperantiĝo en la kongres-urboj, kie estis brilaj esp. spektakloj (ekzemple Krakovo) kie nun ekzistas nur kelkaj esperantistoj, — ĉio ĉi montras, ke nia movado estas nur supraĵa.

Paperaj sukcesoj: jes, tiajn mi legas en la esp. gazetoj abunde; sed praktika uzo; tre malofte! Mi do ripetas: Ni skribu nur la veron! (Ne pensu, leginte ekzemple la raportojn pri granda societa vivo de Esperanto en Budapeŝt, ke ĉi tie estas miloj da esperantistoj! El tridek kunvenantoj eĉ dek ne parolas tute flue kaj en la tuta lando eble ne estas ducent flue parolantoj!) Ni ne trograndigu! Prave! Sed se ĉiuj esp. gazetoj en ĉiuj numeroj, certe nevole, nur per simplaj raportoj de okazintaĵoj ŝajnigas nian movadon multe pli granda ol ĝi efektive estas, mi opinias, ke estas mia devo iom pessimiste sed objektive montri al la pli seriozaj samideanoj la veran situacion.

Mi volis per tio, ke ili ĉiuj pripensu metodojn, per kiuj ni, ne nur sur la papero sed en la praktiko, atingu sukcesojn kaj antaŭenmarŝon de nia movado! Mi ripetas: antaŭ ĉio per ĉiuj fortoj ni pligravigu la organizacion de UEA! Ni faru, ke Esperanto progresu sendepende de kelkaj entuziasmoj kaj propagandistoj, kaj ke la efiko de nia laboro restu ankaŭ tiam, kiam ni ne plu estos tie. Kaj ĉi tio estas la plej malfacila. La grandajn sukcesojn paperajn ni uzu por propagandi inter la amasoj! Inter ni, ni sciu ĉiam la veran situacion!

Paulo Balkanyi.

### Kongreso por la Organizo de la Intelekta Laboro.

Laŭ iniciato de la Unuiĝo de l' Internaciaj Asocioj okazos nunjare „Tutmonda Kongreso por la Organizo de la Intelekta Laboro“ la 20. 21. kaj la 22. aŭgusto, kaj ĝin ĉefe okupos la studo pri la nunaj vivkondukoj de la intelekto kaj de la intelektuloj. Samtempe komenciĝos la dua kunsidaro de la Internacia Universitato, kiu daŭros ĝis la 15. septembro. Aliaj kongresoj estos organizataj dum tiu sama periodo.

Ĉiuj kunvenoj kaj kongresoj trovos lokon en Bruxelles, en la „Monda Palaco“, kiun la belga registaro afable metas je la dispo de la Unuiĝo de l' Internaciaj Asocioj.

atingebla per la ĝenerale uzataj fulmo-forigiloj kun aliaj enkapitaj ŝtangoj kaj specialaj kondukaj dratoj, sed ankaŭ per konvenaj interligoj de la jam ekzistantaj enstantaj metalpartoj. Ke tiu lasta maniero de la fulmo-forigado estas nur malofte farata, eble havas kaŭzon en tio, ke la konstruistoj malofte pripensas tiun problemon, alie ankaŭ en tio, ke la konstruo de tiaj simplaj fulmo-kondukiloj enpoŝigas malmulton da gajno kaj tial ne trovas bonan atenton de la industrio.

La kontraŭdiro, ke pluvo-kondukilaj tuboj kaj aliaj ne estas konvenaj por fulmo-forigo, ĉar la interligo ne ĉiam havas metalan senmakulan kunligon, estas ne pruvebla, ĉar la fulmo transsaltas la aer-interpacon sen efiko de malutilo. Je la fulmo-forigiloj en la alteinitaj teknikajoj la fulmo devas transsalti aerspacon ĝis 20 mm, por kaŭzoj tie ĉi ne klarigeblaj. Estu nur atentigata je tio, ke apud saltejoj, kie la ekapero de la faireroj estas ebla, ne ĉeestas facile ekbrulemaj aĵoj.

Ĉar la konstruo eĉ de simpla fulmo-forkondukilo povus esti ankoraŭ tro multekosta por malgranda posedanto je unuofa faro, en fulmondanĝeraj regionoj kelkaj posedantoj povus kunagi por malgrandigi la elspezojn ĉe amaskonstruo. Por konstruaĵoj sen specialaj metalpartoj estus la penseble plej simpla terenkonduko el dika ferdrato, rubandfero aŭ alia, kiu estas munita laŭlonge de lairsto kaj irus kun unu aŭ du finoj teren, kie ĝi finiĝu, se tiel eble, en la grundakvo. Farinte kelkajn de tiaj instalaĵoj en komunumo, la komunumaj metilistoj povus mem fari tion sen malfacilo. Precipe ankoraŭfoje oni pripensu, ke la plej simpla fulmo-forigilo estas ankoraŭ pli bona ol neniu.

Tred. Delvirkema.

### Terenigaj fulmoj kaj simplaj fulmo-forigiloj.

Malgraŭ ke la fulmo pereigis grandan nombron da homoj kaj kaŭzis multegon da malutilo je materialo, tamen ĉe multaj posedantoj estas malmulte da intereso protekti sin kontraŭ tiaj danĝeroj.

Per okazintaj terrenigaj fulmoj oni povas fari konkludojn, laŭ kiuj oni povas eltrovi antaŭrimedojn ŝirmi sin kontraŭ tiaj fulmoj.

Informinte sin pri la vojo, kiun la fulmo elektas terenirante, oni trovas, ke sufiĉas simplaj rimedoj ŝirmi konstruaĵojn kontraŭ fulma malutilo.

Je nur parte difektitaj konstruaĵoj, la vojo de la fulmo post okazinta eniro estas fiksebla laŭ tio, ke la fulmo dumvoje kaŭzas detruojn je ligno kaj muroj (duongvidiloj), dum metaloj montras kelkfoje fendetojn je la eniro respektive la eliro. Karakteriza estas por ĉiuj terrenigaj fulmoj, ke la enirejo plej multe estas je la plej alta pinto. La fulmo bezonas dum la vojo teren plej eble metalpartojn esiantajn ene aŭ ekstere de la konstruaĵoj, kaj se tiaj metalpartoj ne ekzistas, ĝi kaŭzas detruojn dum la transsalto. De metaloj tiuj kun granda supra estas preferataj, kiel tegmentaj fluoj, pluvdefluiloj, metalaj firskoviloj, dratretoj de gipsmuroj kaj similaj.

Ne trovante metalojn (bonaj gvidiloj) la fulmo uzas duongvidilojn, ĉar ĝi preferas lignon al sekaj muroj. Facile ekbrulemaj materialoj (fojno kaj papilo) ofte estas ekflamigataj. Precipe tre bone peranta objekto estas siafoje pro la tero per la ĉiara pura fluidaĵo bongvidigita.

## 21 membroj de la Franca Akademio de l' Sciencoj subskribis rezolucion por Esperanto.

La aŭtentikan dokumenton ni represos france kaj esperante en nia venonta numero.

Simila rezolucio por Esperanto estas akceptita de du gravaj asocioj: „Generala Asocio de Ŝtataj Inĝenieroj kaj Inĝenieroj de Publikaj Laboroj“ kaj de „La Societo de Urbaj Inĝenieroj de Paris“ kaj de publikigita en ilia bulteno. Laŭ la rezolucio la du societoj formis apartajn poresperantajn komisionojn. La rezolucio estas sekvo de propaganda parolado de s-ro Archdeacon kaj de la agado de niaj fervoruloj Cosic kaj Tiard, membroj de ĉi-tiuj societoj.

## Franca Esp. Kongreso en Orléans.

La unua franca postmilita kongreso okazos la 15. kaj 16. majo en Orléans. La urbestro kaj la prezidanto de la komerca ĉambro akceptis la honoran prezidantecon.

La laborprogramo de S. F. p. P. E. estas jena:

1. Raporto de la prezidanto pri la propagando en scienco, pedagogia kaj komerca medioj.
2. Raporto de la vicprezidanto pri la organizo, la S. F. p. P. E. kaj la reformigo de grupoj.
3. Raporto de la kasisto.
4. Elektioj.

La sekretario de la organiza komitato estas: s-ro Leroy, rue de Tous-les-Saints, 10, Orléans.

## Nordokcidentgermana Eperantista Kongreso en Harburg a. E.

(apud Hamburg) 4.—5. majo (Ĉieliron kaj antaŭvesperon). Adreso: P. Hübner, Harburg a. E. Reeseberg 56. Kongresejo: Schützenpark (atingebla per iramvolo n-ro 34). Esperanta ekspozicio en la urba Gewerbe- u. Handelsschule (3. Bergstr.). Ĝis la 25-a de aprilo aliĝis 165 personoj el 31 lokoj. Eksterlandaj samideanoj estas insiste petataj, sendi saluttelegramon al la kongreso, ĉar tio fre efikas la urbajn estrarojn, kiuj ĉeestas la malfermon. — Telegramadreso: Esperantotag, Schützenpark Harburgelbe.

Programo.

4. majo, 8 h. vesp. Publika soleno (Malfermo, salutparoloj, vira horo, salutpoemo, festparolado (dir. d-ro A. Möbusz, Lübeck), prezento de Esp.-instruado, solokanto de la himno, vira horo en Esperanto.)
5. majo, 9.30 matene: Generala kongresa kunsido.
  - 12.30 Fotografado.
  - 12.45 Komuna tagmanĝo.
  - 2.00 ptagn. Specialaj kunsidoj de Nordalbinga Esperanto-Ligo kaj de Germ. Lab. Esp. Asocio. Ekskurso en la „Haake“.
  - 4.00 Ferma kunveno en „Adlerhorst“.
  - 7.00

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Sidlovská.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (21-a daŭrigo.)

„Jes,“ murmuris Dima iom konfuzita. „Ni tiam estus perdintaj nian tutan komunuman teron! Sed tiam ni havis ion por perdi. Kaj nun? Ĉu tio ĉi nin koncernas? Oni pagas monon, diablo ilin prennu, kaj finita la afero!“

Mateo ne sciis kion respondi, sed li estis viron obstinega.

„Mi ne konsentas,“ li diris, „kaj se vi deziras obei mian konsilon, mi admonas vin ankaŭ mal-konsenti. Plej bone estus, se vi havus neniujn aferojn kun tiu sentaĝulo...“

Mateo senĝene montris per la fingro al Paddy, kiu atente observadis ilian interparolon kaj nun, vidante la lastan geston de Mateo, gaje ekbalancis la kapon. Sed Dima, kompreneble, ne sekvis la konsilon de Mateo.

„Bone!“ li diris. „Se vi estas tia obstinulo, mi sola havos profiton. Se eĉ ne grandan, tamen ioman...“

En la sama tago li sciligis Mateon, ke li jam estas enskribita.

XII.

Ĝis nun neniu letero alvenis, kaj tagoj post tagoj pasas! Mateo plej ofte sidis hejme, atendante la tempon, kiam fine li povos veturi al amerika kamparo. Sed Dima ofte estis akster la domo, kaj revenante li ĉiam rakontis al sia amiko novaĵojn.

„Hodiaŭ Paddy montris al mi perpugnan interbataĵon“, li foje rakontis. „Vi eĉ ne povas prezenti al

## Komerca Ĉambro de Olomouc por Esperanto.

Informite pri la decido de la Komerca Ĉambro de Paris, la Komerca Ĉambro de Olomouc (Ĉeĥoslovakio) respondis al informita samideano jene: Komerca kaj Metia Ĉambro en Olomouc.

N-ro 4432. Olomouc, la 2. aprilo 1921.

Al s-ro A. Kudela en Olomouc!

Je via letero de 26. marto rilate la enkondukon de Esperanto kiel objekto de instruado en la komercaj lernejoj, la subskribita Komerca kaj Metia Ĉambro informas, ke ĝi plej multe helpos viajn klopodojn kaj subtenos en la sfero de sia agado la instruado de Esperanto, tiom pli volonte, ke la malfacila komerca situacio kaj la batalo pri la monda merkato nepre postulas rimedon por interkompreno de la popoloj, kaj laŭ la atesto de la personoj konantaj la aferon, la lingvo Esperanto estas en plej granda mezuro kapabla esti tia lingvo de interkompreno.

Komerca kaj Metia Ĉambro de Olomouc. Vicprez. de la Administra Komisiono: Picha pm.

Sekretario: Dr. Sverák pm.

## La internacia Universitato.

(Sidejo: Monda Palaco, Bruselo.)

La konsilantaro de la Internacia Universitato kunvenis en Bruselo la 24-an kaj 25-an de marto. Ĝi notis komunikojn senditajn de la universitatoj en Zürich, Lisbo, Praha, Bristol, Kopenhavn, Leiden, Liverpool, Tokio, Warszawa, Cambridge, k. c.

Ĝi definitive decidis pri la dato kaj daŭro de la dua kunsido de la Universitato, kiu okazos de la 20-a de aŭgusto ĝis la 15-a de septembro en la sidejo de la Universitato. La elaborita programo citas la kunhelpo de 80 diversnaciaj profesoroj, kiuj faros proksimume 500 lecionojn. Universitata rondvojaĝo estos organizata, kiu donos al ĉiu studento la okazon por viziti unuope aŭ grupe la de li elektitajn fremdajn universitatojn.

La Konsilantaro de la Internacia Universitato nun konsistas el: S-roj Altamira (Madrid), Appleton (Lyon), Boillot (Bristol), Fueter (Zürich), Jonesco (București), La Fontaine, Paul Oilet (Unuigo de la Internaciaj Asocioj), Smets (Bruxelles), Tille (Praha), Volterra (Roma).

## Jubileo de D-ro Giesswein.

Oni festis la 40-jaran jubileon verkistan de Aleksandro Giesswein, prezidanto de Hungara Esp. Societo, en unu el la plej grandaj burĝaj kluboj de Budapeŝto. Estis neatendita surprizo por la ĉeestantaro, ke nia s-ano d-ro Karlo Mezei faris esp. paroladon al la festato. Oni konjektis, ke li parolis itale, hispane, lafine ktp., ĝis kiam oni eksciis, ke li parolis esperante. Estis efika propagando, ĉar multaj el la ĉeestantoj ekinteresiĝis, kiamaniere ili povus lerni Esperanton.

## Lernejo.

La estraro de la popol-alternejo en Freiburg i. Br. (Germ.), sub prezido de zoologisto s-ro sekreta kons. Speman, decidis permesi la instruadon de Esperanto. La unua kurso okazos en venonta vintra semestro (instr. s-ro Franz Döring).

vi, kiom multe amerikanoj ŝatas interbataĵon. Tuj kiam du viroj le ekdisputas, la ceteraj ilin ĉirkaŭas, iuj kun pipoj, aliaj kun cigaroj aŭ tabakmaĉaĵo, kaj oni atendas. La disputantoj tuj senjekiĝas, suprenvolvas la manikojn, svingas, turnas la brakojn kaj frap, frap! la malpli lerta jam havas bluaĵon sub la okulo. Ili prefere batas la vizaĝon, la nazon aŭ la orelojn. Neniam ventron aŭ bruston — Dio gardu! Ĉio estas farata tute senkolere, kaj kiam unu falas la piedojn supren, oni lin helpas levigi, lavas al li la vizaĝon, kaj ree komenciĝas komuna kariludado aŭ trinkado, kvazaŭ nenio okazis. Oni poste nur pritraktas la aferon, kian frapon faris tiu aŭ alia, kia frapo estus preferinda.

„Tute vere,“ jesis Bork, kiu aŭdis la rakonton de Dima. „En tuta Ameriko oni multege ŝatas boksojn. Kiam montriĝas inter ili eksterordinaraj forteguloj, ili veturas de urbo al urbo kaj interbataĵas publike por granda monsumo. Kaj sciur: tiam ĵurnalistoj veturas kun ili kaj ĉion prinotas. Eĉ telegrafe ili informas siajn redakciojn: — Je 15 minutoj 4 sekundoj post la dua John faris bluaĵon sub la dekstra okulo de Jack!“ per tia kaj tia maniero, kaj unu duonon da minuto poste Jack sukcesis jen kiamaniere faliĝi John-on. — Tiam en multaj urboj homoj, sidante en restoracioj, legas ĉi-tiujn novaĵojn kaj diskutas, per kia plej bona maniero Jack povus ekfrapi John-on kaj male. Oni eĉ vetas kaj — ĉu vi kredos al mi? — oni perdas per tio multe da mono.“

„Sentaĝuloj!“ diris Mateo. Foje vespere Dima revenis hejmen kaj rakontis, ke hodiaŭ il li elektis la novan urbestron, tiun saman, kiun deziris Tammany-Hall.

„Varmega batalado estis, ho, jes!“ li fanfaronis. „Tamen ni venkis! Kaj Paddy diras, ke ne multe helpis niaj ‚falsitaj‘ voĉoj.“

\*) Elpar. Ĉek.

## Postkongresa vojaĝo post la XIII-a.

La „Ligo de germanaj Esperanto-societoj en Ĉeĥoslovakio“ aranĝos post la XIII-a en Praha postkongresan vojaĝon tra la bohemiaj banlokoj mondkonataj kaj tra la vidindaj pejzaĝoj kaj urboj de norda Bohemio. La vojaĝo estas agrabla daŭrigo de la kongreso kaj due la partoprenontoj helpas propagandi nian movadon en tiuj ĉi regionoj.

La vojaĝantoj estos kondukataj tra la ferindustria urbo Plzen, Marienbad, konata banurbo, Eger, malnova historia urbo (Wallenstein), al Franzensbad, banloko, kiu siarigis la unuan Esperanto-monumenton en la mondo. Veturo al Karlsbad, mondkonata urbo kun beleĝa ĉirkaŭaĵo, ekskurso al Joachimstal, radiumminejoj kaj radiumbanoj, tre interesaj por kuracistoj, Saaz, mondkonata lupolkomerco, Teplitz, banloko, Leitmeritz, komenco de la ŝipveturado tra la Elbo-valo kun ĝia beleco ĝis Hernskretsch, ekskurso al la „Bohema Svisio“, Teitschen-Bodenbach, komerca kaj industria limurbo, al Reichenberg, industria kaj komerca urbo de la nordbohemia industria centro. Vizito de la II-a Internacia Foiro de Reichenberg (15. ĝis 21. VIII.), oficiala postkongreso de la ligo kaj solena finiĝo de la vojaĝo. Ekskursoj en la beleĝa ĉirkaŭaĵo de Reichenberg.

La vojaĝelspezoj por fervojoj kaj ŝipo 150 kronojn ĉsl.; ni esperas ricevi rabaton de la ministerio.

Detaloj pri la vojaĝoj aperos en la gazeto „La Marto“. Krom tio estos dissendataj specialaj presajoj priskribantaj la tutan vojaĝon.

Aliĝojn bonvolu sendi al: S-ro kapitano Franz Beran, Leitmeritz, Lange Str. 23, sekretario de la postkongresa vojaĝa komitato (P. V. K.). Bonvolu aldoni respondkuponon aŭ nacian poŝtmarkojn por respondi.

Ligo de germanaj Esperanto-societoj.

1. prezidanto: Ing. G. Scholze.

## Skoltoj kaj Esperanto.

La kongreso de tutmondanaj skolt-organizaĵoj okazos dum jaro 1924 verŝajne en Polio. Je tiu okazo helplingvo estos nepre necesa. Pro tio jam nun multaj skolt-organizaĵoj en Polio faras preparojn por ekleri Esperanton. Interesuloj dezirantaj detalojn sin turnu, aldonante 1 resp. kup. al Pola Esp. Servo, Bydgoszcz (Pol.), Podgorze 17.

## Kroniko.

BUDAPEST. La 15-an de aprilo oni solenis per malgranda festo en la Socia Muzeo la mortdatrevenon de d-ro Zamenhof. F-ino Terinjo Tamas deklamis la poemon „Sub la verda standardo“, s-ano Juĵo Baghy faris elokventan hungaran paroladon kaj deklamis poemon, d-ro Lorand laŭlegis el la fama libro de Privat pri d-ro Zamenhof.

S-ro Laquer faris paroladojn en knabinlernejo kaj en knaba mezlernejo, sed kursoj ne komenciĝis.

PRAHA. Rondeto de esperantistinoj en Praha malfermis la 5. marto progresivan kurson (25 p.), instruas f-ino J. Supichova. — La 25. marto okazis 2-a ĝen. kunveno. Estis elektata jena estraro: prez. f-ino J. Supichova, vicprez. f-ino M. Moudra, 1. sekr. f-ino S. Dlouha, 2. sekr. f-ino M. Součková, kas. f-ino Starchova, bibl. f-ino Nesmerakova ktp. — Membraj kunvenoj okazas ĉiulunde je 7.30 h. vesp. en Zensky Vyr. Spolek, Praha, Resslerova str. 5. Ilin gvidas kaj pri gvidado de fremduloj tra Praha instruas f-ino L. Dandova.

En tiu vespero Paddy kaj liaj kunuloj estis tre gajaj kaj bruemaj. Ili vizitis drinkejon, ne multe trinkis kaj regalis Dima'n. Dima revenis kun ili ruĝvizaĝa, parolema, eksterordinare senĝena.

Mateo sidis sur sia lito ĉe lumanta gasbraketo apud malgranda tablo, ĉense legis la biblion, ne atentante la konfuton de Dima.

Tamen post kelkaj minutoj Dima aliris lin, metis la manon sur lian ŝultrojn, kliniĝis al lia vizaĝo tiel proksime, ke Mateo flaris brandan odoron.

„Aŭskultu, Mateo!“ li diris per iom flatemala voĉo. „Jen kion mi volas diri al vi. Ili... ili deziras vin regali.“

„Dankon, mi ne volas,“ respondis Mateo, ne interrompante la legadon.

„Kaj plue. Mi petas, ne malkomprenu tion! Ĉiu popolo ja havas sian kutimon, kaj en fremdan monaĥejon — estas dirite — oni ne eniras kun sia propra regularo.“

„Pro kio tiaj paroloj?“ severe demandis Mateo.

„Pro tio, ke Paddy deziras kun vi interbatiĝi...“ Mateo malfermegis la buŝon por miro, kaj la du kamaradoj dum duono da minuto silente rigardadis sin reciproke. Poste Dima deturnis la okulojn kaj diris:

„Se ili havas tian kutimon...“

„Aŭskultu, Dima!“ serioze diris Mateo. „Kial vi opinias, ke ilia kutimo nepre devas esti bona? Laŭ mia ŝajno, ili havas multe da kutimoj por kristana homo tute ne imitindaj. Ĉi tion mi, Mateo Lozinski, diras al vi por via utilo! Jen vi jam ŝanĝis vian vizaĝon, baldaŭ vi ekhontos por via religio. Kaj kiam vi venos en estontan mondon, via propra patrino ne scios, ke vi estis Loziŝcano.“

(Daŭrigo.)

**ZAGREB** (Iugoslavio). La 3-an de aprilo la societo de esperantistoj en Zagreb aranĝis publikan esp. paroladon en ĉambro de l' popola universitato. Parolis s-ro Jerić pri la volo. — La naskiĝtago de Petar Prera ovigis estis festata per soĉia kunveno, kun deklamo de esperantigitaj poemoj de la granda jugosava verkisto. Belan enkondukan paroladon faris s-ano Ĥupić. — La sekvintan sabato Ĥino Peras kaj s-ro Manojloviĉ ludis gajan komedion iraduktajn Esperantojn de Ĥino Manojloviĉ. — En lasta monato aliĝis 5 membroj. Nuna stato 141 membroj, el kiuj 85 estas anoj de UEA. Po unu kurso por komencantoj kaj progresintoj daŭras. Membroj de la societo instruas private 55 personojn. Multe da artikoloj kaj notoj pri Esperanto aperis en la loka gazetaro.

## Esperanto en Polio.

(Raporto de Pola Esp. Servo.)

**BYDGOSZCZ.** Kelkloke okazas bone vizitataj kursoj. Propagando tre vigla. Dissendo de propagand-cirkuleroj al Komercia Ĉambro, Urba Biblioteko ktp. — „Volkszeitung“ (red. s-ano Pankraŭ) daŭrigas sian ĉiusemajnan esp. anglon. La artikolon de „Nowe Tory“, titolitan „Alvoko al la Kristanoj de ĉiuj nacioj“, reprints el Esperanto kelkaj naĉaj ĵurnaloj, kiel: Deutsche Rundschau en Polen, The Deal, Walmer & Sandwiche Mercury (Anglio), Diario Regional (Hispanio). La enhavo de la alvoko estas popracaj kaj postulas de la registaroj enkondukon de Esperanto en ĉiujn lernejojn. Samideanoj volontaj traduki la alvokon en naciajn lingvon, postulu ĝin de redakcio de „Nowe Tory“, Bydgoszcz (Polio) aŭ reprints ĝin el la maria numero de „Espero Katolika“ (Wien). — La 17-an de aprilo okazis ekzameno de samideanoj dezirantaj ateston pri instrua kapableco. Ekzamenis s-ro prof. Kronenberg, ateston ricevis Ĥino Jedrzejewska, s-ro Edm. Felhke (gasto supra-silezia) kaj s-ro Fr. Prengel. — Regula kunveno de „German-Pola Asocio“ ĉiŝmarte je 7.30 h. en urba liceo, Konarskiego 1.

**KOSCIERZYNA.** S-ro Sielke gvidas kurson en tiea seminarion kun 30 seminarianoj. La direktoroj de la seminario tre favoras la movadon.

**LODZ.** Ĉi tiu urbo estas eble la sola en Polio, kie Esperanto jam tre forte enradikiĝis. Fondo de „Propaganda Komitato“ ĉe „Lodza Esp. Societo“. Gvidantoj s-roj Berman kaj J. Lejzerowicz (por interjuna propagando). — Amuzas vesperon kun propagandoparoladoj en Esp. de s-ro Lejzerowicz, germane de s-ro Zimmermann. Neta gajno de ĉi tiu vespero: 10 000 mk. kaj granda nombro da esperantemuloj. — En februaro okazis en Koncerta Halego grandioza maskobalo sub nomo „Sub la Verda Stelo“. Sukceso: 50 000 mk. da pura profito kaj malfermo de nova esp. kurso kun 30 personoj (gvidanto Lejzerowicz). — Ankoraŭ unu sukceso: la loka grupo petitis la urban konsilantaron transnavigi unu el la Lodz'aj stratoj je „Zamenhofa“. Malgraŭ publikaj protestoj de sovinstoj, dank' al kunhelpo de s-ro urbestro Rzewski, honora membro de la esp. societo, de urb-konsilantino Singer kaj de s-ro Berman oni decidis transnavigi straton Rozwadowska, en kiu troviĝas gimnazio, kie oni instruas Esperanton, je strato „Zamenhofa“.

**LOMZA.** S-ro prof. Kronenberg (frato de prof. Kronenberg en Bydgoszcz) gvidas kurson en tiea seminarion.

**OLKUSZ.** S-ro Witkowski faris propagandoparoladon. Sukceso: kurso kun 30 personoj.

**POZNAN.** Del. de UEA: s-ro universitata prof. Rzosek kaj s-ro Borkowski; favoraj esperantistoj estas ankoraŭ s-roj univers. prof. Lovelle kaj Skulski. „Posener Neueste Nachrichten“ aperigis ĉiusemajne esp. anglon.

**TORUN.** La ĵus por Esperanto gajnita „Thorner Zeitung“ komencis laŭ metodo de aliaj ĵurnaloj en Polio presigi ĉiusemajne esp. anglon kaj eĉ longajn artikolojn.

## Internacio Katolika.

Moka.

**POLIO.** La 12. aprilo la Bydgoszcz'a Moka-grupo „Antaŭen kun kredo“ aranĝis en aŭlo de urba liceo publikan adiaŭvesperon je honoro de sia nun formigrona fondinto prepozito kaj ekl. konsilanto Becker. Ĉeestis ĉ. 70 personoj. Festparoladon faris prof. Kronenberg; Ĥino Jedrzejewska, dirigente adiaŭpoemon verkitan de prof. Kronenberg enmanigis al s-ro Becker diplomon subskribitan de ĉiuj grupanoj. F-ino Krafiĉ kamis belan arion, s-ro Napiatek diris versajon. Parolis ankoraŭ s-roj Kowalewski, Szalla, Pankraŭ kaj Prengel. Ĉeestis gasto el Supra Silezio s-ano E. Felhke. S-ro Becker iros al Breslao.

## Sporto, Laboristoj kaj Esperanto.

Lastatempe oni komencis ankoraŭ en laboristaj sferoj pli kaj pli turni atenton al la sporto kiel efika ilo por levi tiel la spiritan kiel la fizikan staton de la laboristaro. Por la venonta somero oni planas „Olimpladon de la Laboristaro“ en Praha. La ludoj okazos en la fino de junio, kaj laŭdire eĉ Sovjeta Rusio estas invitita. Antaŭ nelonge bando de finnaj laboristaj luktistoj vizitis diversajn lokojn en Germanio, ĉie montrante la nunan superforton de finna lukt-arto. Laŭ tiam farita interkonsento la partoprenintoj promesis

lerni Esperanton por ĝin uzi en sia interkomunikado somere, kiam la germanoj siavice vizitos Finnlandon.

## Tra la Mondo.

La germana registaro direktis al la registaro de Usono noton kun novaj germanaj pagpropozonoj.

Spontana plebiscito en Tirolio pri aligo de la lando al Germanio rezulzigis 98,6% por la aligo.

En Hungarujo estas granda sekeco. Pri tio raportis al ni samideano: En la lastaj sesdek jaroj ne estis tiel longa sekeco ĉi tie kiel nun. En 1884 estis de 7. majo ĝis 9. junio (do 32 tagoj) neniam pluvo, en 1865 ne pluvis 31 tagojn, sed nun de 7. mario ĝis 13. aprilo (do 37 tagoj) ne pluvis. Fine venis pluvo, sed ĝi ne sufiĉas. Tiu ĉi grandega sekeco povas esti katastrofo por la lando vivante sole aŭ precipe per la tero, por la rikolto.

En Anglio estas 44 minejoj subakvigataj. En normalaj tempoj tiuj ĉi minejoj okupas 16 200 personojn.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL POLIO.

Bydgoszcz, aprilo 1921.

Forpasis la spirita batalo en Supra Silezio. La opaj rezultatoj de la voĉdonado spektakle estas publikigitaj en la gazetaro. La korteco de la venko, kiu antaŭe regis ĉe poloj kaj germanoj, restis ankoraŭ post la okazinta voĉdonado, ĉar mankis ankoraŭ la preciza finrezultato. Laŭ voĉoj ricevis Germanio plimulton, nome pli ol 700 000, dank' al granda nombro de elmigrintoj revenintaj Supran Silezion por voĉdoni. Polio ricevis nur 4—500 000 voĉojn, tamen — kalkulante laŭ apartaj regionoj — la sukceso estas je pola flanko. Precipe en kelkaj industriaj regionoj oni vigle voĉdonis por Polio.

Do okazintaj plisukcesigis la voĉdonadon por la pola respubliko. Nome, la politika situacio en Polio rapide pliboniĝis. La 18. mario, 2 tagojn antaŭ la voĉdonado, preskaŭ neatendite estis subsignita la pac-kontrakto inter Polio kaj Rusio. Samtempe alvenis la komunikilo, ke post longaj prokrastoj (diskutoj komencis jam antaŭ pli ol unu jaro) en pola Sejmo en Warszawa oni fine fiksis lege la konstitucion de l' pola respubliko. Jen, kio plisukcesigis la voĉdonadon por Polio.

En plej proksima tempo decidis nun la „Entente“-konsilantaro pri la aparteno de Supra Silezio. Polion verŝajne estos aljuĝataj la regionoj dekstre de la Odra-rivero. Sed aŭdigas ankoraŭ aliaj proponoj. La germana registaro intencas proklamigi „Liberan Staton de Supra Silezio“. Similan planon havas laŭ lastaj komunikiloj la angloj. Ili deziras la aljuĝon de polaj partoj al Polio, de germanaj al Germanio; la miksitaj regionoj restu neŭtralaj sub kontrolo de la Ligo de Nacioj. La plej proksima tempo montras, ĉu la laste nomitaj proponoj restos nur piaj deziroj. „Videant consules!“

Pola Esp. Servo.

LETERO EL TURKUJO.

Konstantinopolo, aprilo 1921.

Do jarojn post la fameza interpaco ni vidas la militon — ĉu efektive ĝi estingiĝis en tiu tempo? — rekomenci egale vivigeme kaj sovaĝe.

En tiu ĉi tempo ne nur ŝanĝis ĝia sceno kaj kampo, sed ankoraŭ ŝanĝis la malamiko. Kaj se ni tuj opinias vidi kiel kontraŭulojn sur la vastio de Malgranda Azio la helenojn kaj la turkojn, tamen ĉiu atentema observanto malantaŭe vidas la ĉefajn personojn de la dramo. La milito fariĝas precipe inter la aliancanoj de hieraŭ kaj de hodiaŭ. Francujo kaj Italujo, ĉiu aparte, ambicias ĝui la turkan ekonomian kaj komercan gajnojn, kiujn Germanujo estis devigata (de ili) forlasi. Aliparte Angluo deziras superregon super Turkujon, tenante en siaj manoj Konstantinopolon kun la fortoj kaj, kaŭze de tio kreigis per ĝiaj duaj konkurantoj la turka revolucio. La turkoj estigas novaj herooj, kaj la militprovizoj, kiuj ne estis utiligitaj kontraŭ la germanoj, sendiĝas por esti uzataj kontraŭ la helenoj.

Kaj la milito rekomencas, la popoloj suferas la multepezajn konsekvencojn de tiu ĉi milito, kaj la homaro fuŝigas por satigi la molohon de la diplomatio.

Th. C. M.

ENIGMOJ.

SOLVOJ el n-ro 23.

21.

1. Luno,
2. Akvo,
3. Rifo,
4. Astro,
5. Bromo,
6. Iriso,
7. Stelo,
8. Teluro,
9. Onikso,
10. Junio,
- La Rabistolo.

22.

mu ro  
so zo

(Pro manko de loko ni provizore ne plu aperigos enigmojn, ĝis la plimultiĝo de la ĵurnala stato fakte.)

## Parolejo.

71.

Salutformoj.

Oni bonvole respondu: ĉu estas konsilinde uzi kaj oni uzas la salutajn formojn: bonmateno, bontago, bonvesperon, bonnokton, bondormon, belsongoj, bonapetiton, bonvojaĝon ktp.? La praktiko tre pragmatik salutanteron mallongan, bonŝancon kaj tute laŭfundamentan.

(A. C. Targul-Mures, Rumanio.)

72.

Rimarkigo de la Redakcio pri 68.

1. Ni scias bone, ke multaj abonantoj preferas malpli grandan formaton kaj ankoraŭ Ĥo duoblan nombron da paĝoj. Ni elektis la grandan formaton por prezenti nian gazeton kiel veran ĵurnalon similan al naĉaj ĉiutagaj ĵurnaloj kaj por impresi la esperantistojn publikon. Ni eĉ intencas, se eble, ankoraŭ pligrandigi la formaton ĝis tiu de la grandurbaj ĉiutagaj ĵurnaloj, pro la menciita propaganda celo. Kompreneble — koncerne la kompostadon kaj presadon — estas indiferece, ĉu la ĵurnalo estu kvadrata kaj grandformata aŭ okpaga kaj malgrandformata.

2. La literoj dezirataj de s-ro d. V. estas la ordinaraj latinaj, tiel nomataj „antikvaj“ literoj. La de ni uzataj literojn ni nove aĉetis speciale por nia ĵurnalo. Ni elektis ilin, ĉar ni volis doni al ET modernan aspekton. La de ni uzataj literoj estas kreitaj de la fama artisto Kleukens kaj liveritaj de la konata literfandoejo Bauer en Frankfurt kaj Barcelona; ili estas tre ŝataj por sia granda klareco kaj Ĥi en Germanio, kaj ankoraŭ aliaj esp. gazetoj kaj libroj aperas parte presite per tiuj ĉi literoj (ekz. Internacia Komercia Revuo). Ni petas niaj negermanaj legantoj komuniki al ni, ĉu ili ankoraŭ sentas la strancecon de la literoj.

3. Ni tute konsentas, ke estas pli bone kiel eble plej eviti mallongigajn kaj uzati nur la ĉie konatajn.

73.

(Rilatas al 68.)

Est. sinjoro! Pri proponoj mi opinias jen: 1. Formato: La proponita formato eble estus pli oportuna por la leganto, sed — kio ŝajnas al mi pli grava — ne por la propagando. La nuna formato faras multe pli grandan impreson al la nescianta publiko. 2. Literoj: Kritiko prava. La nun uzata speco ne estas rapide legebla. Sed, kompreneble, vi ne povas forĵeti per unu foto.

3. Mallongigoj: Afero negrava.

(J. Schenkel, Friedrichshal.)

74.

(Rilatas al 68.)

Pri punkto 1 mi tute ne konsentas. ET ja devas evoluigi esperable baldaŭ kiel taga ĵurnalo, kaj ĝuste tiel bezonas la formaton. Ĉu la lastaj venkoj por ni esperantistoj estas tro grandaj, ke ni deziras malgrandajn gazetojn?

(Amort en Praus.)

75.

Pri „agnoski“.

Vidu ET n-ro 17 „Letero el Litovio“, linio 2. Se „konfesus, malignoras, oficiale akceptas“ ne esprimas la ideon, bonvolu ne enkonduki vorton, kiu neevitigale alvokas la ideon „agnosika“ kun preskaŭ mala signifo. Se ekzistas greka vorto „agnosko“, ĝi havus signifon malan al la latina. Ekzistas antikv- kaj modernegreke „agnoko, agnoo“. Se oni ŝatas ne internacian radikon, ekuir el latina parton „agnit-us“. Tio liveras infinitivon „agni“. Tamen rekonigi aŭ „kogni“ (el internacia vorto „incognitio“, oficiale ne konata) estas rekonebla formo.

(Ch.-G. Stuart-Menteth, London.)

## Pola Esperantista Societo

pro manko de propra organo petas pere de plej disvastigita en Polio ĵurnalo „Esperanto Triumfonta“ ĉiujn polajn esperantistojn komuniki al ĝi siajn adresojn laŭ adreso „Warszawa, Zorawia 19 m. 6“. Tio estas necesa por prepari petskribon al polaj oficoj, konforme al proponoj de s-ro Fujisaŭa.

Por polaj esperantistoj ni povas liveri diversajn vortarojn, lernolibrojn ktp. Krom tio ĉe ni estas aĉeteblaj sekvanaj libroj: Ave Patria — morituri te salutant, Nova Antologio, Consilium Facultatis, Protestilas kaj Laudamia, Ni sekvu Lin, En fumejo de l' opio, Kio okazis foje en Sidono, Kelkaj noveloj, Verdaj faireroj, La luĝo de Oziris, Jarkolekto de Pola Esperantisto 1908. Prezoj tre malaltaj.

## Kiu helpos?

Esperanto bone progresas. En ĉiu numero de nia ET ni legas pri novaj venkoj kaj sukcesoj. En nia patra urbo Neukölln nun jam ĉ. 200 infanoj lernas la helplingvon. En malmultaj semajnoj la nombro duobliĝos.

Samideanoj en Esperantujo, montru ni, ke ni estas veraj internaciuloj! Niaj infanoj devas konatiĝi kun kamaradoj en ĉiuj landoj. Estas ne sufiĉe, ke ili interŝanĝas lerejojn kaj ilustritajn kartojn; ne, ili vizitu fremdajn landojn. Per propraj okuloj ili vidu, per propraj oreloj ili aŭdu, ke ankoraŭ transe de la landlimoj loĝas homoj sentemaj kaj bonaj amikoj.

Tial, samideanoj, arangu ni vojaĝojn de niaj infanoj parolantaj Esperanton. Zorgu ni, ke niaj gefiloj travivu la libertempojn ĉe karaj samideanoj.

Jam en pasintaj jaroj kelkaj germanaj infanoj estis en Danio, Svedio kaj Nederlando. Pripensu, ke ili revenis ne nur kiel entuziasmitaj anoj de nia kara lingvo, ili prenis hejmen profundajn impresojn, parolis lumokule al parencoj kaj kamaradoj, kaj tiamaniere kreigis tute organen en la ĵunlaro vere internacia mentaleco.

Tial, eŭropaj samideanoj, ni kunigu por la belega celo! Kaj vi, ekstereŭropanoj, sendu al ni monon! La valuto de via mono estas alta ĉe ni, kaj jam per malgrandaj sumoj vi povas helpi niajn infanojn kaj samtempe disvastigi Esperanton. Nia ŝatata ET certe presos la kvitancojn pri la sendata monoj.

Oni skribu al instruisto Wittbrodt, Neukölln-Berlin, Anz-ngrubersir. 3.

Ĉiulandaj esp. gazetoj estas petataj reprints la alvokojn.

# Abonoj al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj:  
50 n-rojn por 80 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. fk.,  
20 fr. fk., 5 hol. guld., 2 dolaroj aŭ 50 liroj (lirojn  
ni akceptas nur el Italio); 25 n-rojn por duona  
prezo.

Al Germanio, Baltiko kaj Balkano 10 n-rojn  
por 10 gmk. — Al Polio 25 n-rojn por 150 mk.,  
al Aŭstrio kaj Hungario 10 n-rojn por 50 kronoj,  
al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj.

Germanoj pagu ĝis fino de junio al poŝtĉek-  
konto Köln 70865, Teo Jung, Horrem; post 1. julio  
ill abonon per la poŝto.

Negermanoj el bonvalutaj landoj ne pagu per  
poŝtaviĝoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de  
la kurza valoro, kaŭzante al ni eviteblan perdon.

Niaj Abonejoj.

## AŬSTRIO.

Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

## BILGARIO.

Georgi Hr. Gaševski, Centra Librejo „Esperanto“,  
Bul. Marie Luiza 46, Sofio.

## ĈEĤOSLOVAKIO.

Otto Sklenčka, Hradec Králové.

Prof. J. Süßner, Saaz 687.

## ESTONIO.

Helmi Drezzen, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo  
„Espero“, Rüttili t. 6, Tallinn.

## FINNLANDO.

O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20; Helsinki.

## GERMANIO.

Postisĉekkonto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem  
Bez. Köln.

## HUNGARIO.

Paŭlo Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.

## LITOVIO.

Paŭlo Medem, Kaunas, Smeliu g-ve 12.

## POLIO.

Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

## PORTUGALIO.

Agencia Esperantista, Silva & Carreira, 104,  
Apartado, Lisboa.

# Anoncoj

kostas po cm<sup>2</sup> 1 gmk., 1 ĉ. kr., 1 fmk., 0,10 sv. fk.,  
0,10 pes., 0,10 nord. kr., 0,20 fr. aŭ belg. fk., 0,50 it.  
lir., 2 uson. cendojn, 5 hol. cendojn, 1 angl. penceon,  
2 hung. kr., 3 pol. mk. Rabato ĝis 40% ĉe grandaj  
aŭ ripetataj anoncoj: speciala rabato de 20% por  
esp. firmoj aŭ kolektantoj de anoncoj.

## Al esp. socialaj laborantinoj.

Por revivigi la „Universalan Virinan Asocion“  
mi petas, ke ĉiuj esp-inoj precipe la iamaj laboran-  
tinoj sendu afable siajn proponojn kaj dezirojn  
(ne forgesu aldoni respondokuponon aŭ neuzitajn  
poŝtmarkojn) al

F. Nesmeráková (instruistino)  
aranganino de faka virina kunveno  
de la XIII-a U. K. E.  
Praha-Vršovice  
Barakova 174,  
Ĉeĥoslovakio.

**ROBERT PFENNIGWERTH,**  
**HIRSCHFELDE SAKS., GERM.**  
LIBRO- KAJ PAPER-KOMERCEJO  
KONTORARTIKLOJ

serĉas nur seriozajn reprezentantojn en ĉiuj  
landoj, se eble kun vendmagazeno, je vendo de  
siaj artikloj. La vendo al eksterlando okazus  
nur post antaŭsendo de mono aŭ deponado je mia  
bankkonto ĉe Löbauer Bank, Zweigstelle Hirsch-  
felde Sa., aŭ poŝtĉekkonto Dresden 4761.

## Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.  
(Oksforda diplomo kun distingo).

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon  
pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“

Holanda Pioniro.

„Intereseĝaj tabeloj.“ Kristana Espero.

Vidu citaĵon p. 57 de nova Jar-libro B. E. A.  
Prezo 10 pencej (= 4 respond-kuponoj) afankite.  
B. E. A., 17, Hart Street, London WC 1.

Por svisa franko (por 10 germanaj markoj)

kvin diversaj esperantaj libretoj el la

**HUNGARA LITERATURO**

rekomendite! Sendu la monon antaŭe kun la  
mendo (en enskribita letero) al

**Hungara Esperanto Servo, Budapest VI,**  
Hajos u. 15-II-2.

Pri poŝtmarkoj petu proponon!

# Internacia Foiro de Breslau

Dua Printempa Foiro samtempe 52. Poragrikultura Maŝinfoiro

2.—5. Junio 1921.

Agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiŝkaptado, arbora ekspluato, ĝarden-  
kulturo, birdar- kaj abel-bredado, ĉasado; artefaritaj sterkaĵoj, semajoj; agrikultur-  
industriaj instalaĵoj; maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumetoj kaj konstrumaterialoj;  
\* \* \* \* \* arto kaj artmetio, internaj dekoraciaĵoj; buroajoj; sporto. \* \* \* \* \*

Informojn donas

**Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.**

ESPERANTO-FAKO


Breslau I, Ohlauerstr. 87.

## O. Sklenčka, Delegito de UEA, Hradec Králové Ĉeĥoslovakio

peras kaj prizorgas ĉiujspacajn aferojn kaj rilatojn:  
komercajn, informajn, interŝanĝajn ktp.

## inter fremdlando kaj Ĉeĥoslovakio.

Bonvolu uzi miajn fidindajn servojn!



## ≡ Nia Firmo ≡

komercas Formosajn specialaĵojn, produk-  
taĵojn kaj ankaŭ negocas kiel agente  
komisia de ĉiuj eksterlandaj komercaĵoj.  
Oni korespondas Esperante.

## S-ro So-Pekfui

eksportisto kaj importisto

Manka, Gekanso, Ĉusekilo 105

## Taihoku, Formosa, Japanujo.



## Esperanta-Pola Eldonejo NOWE TORY (LA NOVAJ VOJOJ)

fondita de prof. L. Kronenberg en Bydgoszcz, Polio.  
(Telegramoj: Tory, Bydgoszcz).

## Vendas kaj interŝanĝas

poŝtarkojn el ĉiuj plej vidindaj urboj de Polujo  
(ĉefurbo Warszawa, fama preĝejo Czenstochowa,  
salminejo Wieliczka, Krakovo, Leopolo, Lodzo,  
montaro Karpatoj ktp),

poŝtmarkojn eksterlandajn kaj polajn, tre mal-  
oftajn,

papemonon eksterlandan kaj polan,  
antikvan monon nikelan, arĝentan.

Detalaĵojn por respondokuponon.

Ne sendas unua.

## Volas aĉeti

pli grandan kvanton da prespapero.

## Peras

presadon de broŝuroj en polaj presejoj, malkostaĵ  
pro la mona kurzo.

Donas komercajn informojn.

Serĉas interrilatojn kun presejoj,  
eldonejoj kaj paperejoj.

Aranĝas reklamon en pola gazetaro.

Plena profito por propagando de Esperanto en  
Polujo.

## Stampilojn



liveras

**Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde, Saks.,  
Germanio.**

## Anoncoj.

(Familiaj anoncoj senpage. Aliaj kostas por dufoja  
enpresado la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon  
ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado  
kostas la duoblon.)

BONDEZIRO. La grupanoj de la Moka-grupo „Antaŭen  
kun kredo“ deziras al sia fondinto s-ro prepozito kaj  
ekl. konsilanto Becker, okaze de lia foriro el Bydgoszcz  
ĉian bonon.

RETROVINTO. Samid-ano ISZO BRÜLL nun loĝas en  
Transilvanio, Rumanio, urbo Băntiului.

PETO. Por propaganda parolado, kiam mi deziras ilustri  
per ekspozicio, mi bezonas materialon. Mi petas esperan-  
tistojn en la tuta mondo, sendi al mi esp. gazetojn kaj  
naciajn gazetojn kun artikoloj pri Esperanto, esp. gvid-  
librojn, malkaran esp. literaturon, ilustr. poŝtarkojn, poŝt-  
markojn ktp. Mi danke kvitancojn ĉiun sendaĵon. — R.  
Hering, instruisto, Grethen-Grimma (Saksujo Germ).

PROPAGANDISTO! Bonvolu konstante sendi ĉiujn sci-  
igojn pri interesaj sport-novaĵoj de via urbo kaj de via  
lando per letero por Sport-Revuo al s-ro Stef. Pedrazzini,  
Locarno (Svisio).

SPORT-REVUO Redaktejo de sport-revuo (adreso: s-ro  
Stefano Pedrazzini, Locarno, Svislando) serĉas en ĉiuj  
landoj reprezentantojn (kolektantojn de anoncoj). Nur  
kapablaj agentoj estos akceptotaj. (Referencoj estas  
necesaj).

INSTALIO AŬ KONTORO. Juĉa litova mezlerneja instru-  
istino (esperantistino), dezirante perfektigi en uzado de  
germana lingvo, volas pasigi 2-3 somerajn monatojn en  
Germanio aŭ Svisio. Povas instrui litovajn, latvian aŭ  
rusan lingvon, korespondi en ili aŭ okupiĝi en kontoro.  
Proponojn adresu al: J. Mačernis, Kaunas, Ŭkmerges pl. 45,  
Litovio.

SIGELMARKOJ, INSGNOJ KTP. Unua Viena eldonejo de  
esperantaj propagandaj sigelmorkoj kaj insignoj, Ĵozefo  
Kocourek, gravuristo, petas konatinojn kaj interulojn por  
interŝanĝi, ĉar mi jam hemevenis el rusa militkapitejo.  
Wien X/3, Arthaber-Platz 3-14. Postulu specimencaron  
kontraŭ unu respond-kuponon.

## Korespondeo kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpresado-kostas la samon kiel tri numeroj de  
ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj.  
Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

Interŝanĝi deziras poŝtarkojn kaj poŝtarkojn kun ĉiuj  
landoj s-ro Josef Piechocki, Bydgoszcz (Polio), Lokietki 8  
c. II. Al ĉiu certe respondos.

S-ro Theodor Oster en Godesberg a. Rh. (Germ.), deziras  
interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-ro Hermann Petermann, Hagen i. W. (Germ.), Fleyerstr.  
57, deziras korespondadon kun gesamideanoj en ĉiuj  
landoj. (Poŝtmarkoj, poŝtarkoj kaj leteroj). Tuj kaj ĉiam  
respondos.

Otto Cz.ĉ. fervoj-oficisto, Brunnersdorf apud Kaaden,  
Bohemio, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun ge-  
samideanoj en la tuta mondo per poŝtarkoj ilustriaj;  
interŝanĝas poŝtmarkojn kaj esp. gazetojn.

Bahia Bianca (Argent., Sud-Ameriko), s-ro Alfonso Fuentes,  
str. O'Higgins 80-90, Tienda „La Capital“, deziras kores-  
pondi kun gesamideanoj ĉiulandaj.

S-ro Zoltan Váray, universitatano en Targul-Mureș, strato  
Kemény Zs. 6a (Rumanio), deziras interŝanĝi poŝtarkojn,  
kolorigitajn urbidajojn, hungarajn artajn kartojn, foto-  
grafejojn, interŝanĝi sian portreton. Poŝtmarko bildflanke!  
Tuj respondos.

F-ino Asta Friedrichs, stud. rer. pol., Düsseldorf (Germ.),  
Gartenstr. 46, deziras korespondi per leteroj kun sam-  
ideanoj en Anglujo, Usono, Danujo, Svedujo ktp., pretere  
kun universitataj gestudentoj.

S-ro F. Peedo-Winkel, Fontanka 27, Estokomitee, Petrograd  
(Rusio), interŝanĝas sovjetajn kaj estoniajn poŝtarkojn.

M. Goldberg, Białystok, Polujo, Stenkiewiczka 88, deziras  
korespondi kun gelernantoj en ĉiuj landoj, ankaŭ inter-  
ŝanĝi poŝtarkojn kaj papemonon, kun kiu ajn. Tuj  
respondos.

A. Hiller, Warszawa, Polujo, Ogrodowa 26/51, deziras  
korespondi pri laborista movado, komunismo, ankaŭ  
interŝanĝi poŝtarkojn kaj papemonon. Tuj respondos.

Kiu bezonas bonan polan poŝtmark-kolekton, tiu povas  
interŝanĝi poŝtarkojn kun mi. Mi korespondas ankaŭ  
pri matematiko kaj natur-scienco. Mia adreso: Lazarus  
Grosberg, Białystok, Polio, Jurowiecka 5.

Ladislau Szilasi, Budapest V, Podmanicki u. 75, deziras  
korespondi kun junuloj instruitaj, muzikemaj.

Mi vendas hungarajn poŝtarkojn, multe pli malkare ol  
katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapest VII,  
Wesseleányi str. 50.

S-ano Ferni Urgell, str. Convento 90, Sabadell (Hispanio)  
deziras korespondi kun ĉiuj landoj, tuj respondos.

Grupestro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III, Breslau 13, Ger-  
manio, deziras por siaj 50 kursanoj interŝanĝi kun ĉiuj  
landoj poŝtarkojn ilust., leterojn, poŝtarkojn ktp. Ĉiu  
ricevos tuj respondon.

S-ano Willy Küppers, Düsseldorf 115, E. Kratherstr. 94,  
Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj, tuj kaj ĉiam  
respondos.

Kiu sendas al mi poŝtarkojn de sia lando ricevos mar-  
kajn de mia lando. Ankaŭ mi korespondas per flustr.  
poŝtarkojn. — Helmut Janda, Breslau, Germ., Gabitzstr.  
125, bei Dalowski.

Rudolf Ehm, Dresden-A, Ziegelstr. 52, I, deziras kores-  
pondi per poŝtarkoj ilustriaj kaj interŝanĝi poŝtarkojn,  
ĉiam respondos.